



Kajeroj el la Sudo

ISSN 1886-1997

La 32^a jaro



Bulteno de la Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj

<http://www.gazetoteko.com/kajeroj/k119/k119.html>

Esperantistoj neniam forgesu, ke la Interna Ideo de Esperanto gravas pli ol la lingvo mem

Omaĝe al defendintoj de Libereco, Egaleco kaj Frateco



Boŭeslav' Prus, aŭtoro de *La Faraono*

N^o 119^a

Aprilo 2021

Kajeroj

Bulteno de la Hispana Asocio de
Laboristoj Esperantistaj (HALE).

el la Sudo

Calle Jabonerías, 6.3º D
30010 Murcia
Hispanio

ISSN 1886-1938 (printita)

Prezidas: **Johano A. Cabezos.**

Redaktas: **Jesuo de las Heras.**

Korektas: **Jozefo Pina.**

Retskribu al: kajeroj@gmail.com

Enhavo

Redaktore: Post *La Faraono*.....3

Politiko:

Omaĝe al defendintoj.....6

Civila malobeco.....23

Vakcinoj por ĉiuj.....10

Literaturo:

Irigita de vento.....5

Sanigaj murdoj: ĉ 5^a.....11

La Faraono, ĉ. 68^a kaj fina.....15

Pri civila malobeco.....19

**Pri la enhavo de la
artikoloj respondecas ties
aŭtoroj, ne la redakcio.**

Kovrilo: Aleksander Głowacki, plej konata kiel **Boŭeslav' Prus'**, publikigis je 1897 la libron *La Faraono*, kies traduko de **Kreŝimir' Bein'** ni ĵus finas publikigi en niaj paĝoj ĉinumero. La ceterajn ĉapitrojn oni trovos ĉe niaj numerojn de la 50^a al 118^a.

**Ni ne korespondos pri nepetitaj
artikoloj, kvankam ni klopodos
publikigi ĉiun artikolon, kiun ni
trovos interesa kaj kies enhavo
mistraktas nenium personon.**

Pagmaniero: aliĝu al HALE kontraŭ €10
jare por ricevi la surpaperan version de nia
magazino.

Notu, ke malfrua kotizo povas signifi perdi numeron.

Konto ES61 2038 3123 4460 0007 9941

Notu vian nomon kaj la jaron, kiun vi pagas.

Poste, sendu noton al kajeroj@gmail.com

Ankaŭ eblas protekti la magazinon pere de donaco al la menciita konto, se oni deziras helpi kaj tamen ne ricevi la surpaperan version.

**Oni povas reprodukti la enhavon, kondiĉe,
ke oni citu la originon.**

Tute kreita kaj traktita per senpagaj linuxaj kaj MacOSj ri-
medoj: Scribus, Bluefish, BlueGriffon, Gimp, gFtp kaj yafc.



Nesubskribitajn
artikolojn verkis
la redaktoro.

Redaktore

Post *La Faraono*...

Jen la fino de la fama verko de Boŭeslav Prus, la plej kvalita traduko en Esperanto, farita de KABE, Kreŝimir Bein, kiu forlasis Esperanton pro desaponto pri esperantistoj. Oni kutime referencas al forlaso de nia lingvo de homoj, kiel **kabeo** sed mi ne trovas tio malinda, sed nur troigo kaj malakurata, ĉar ne ĉiuj *kabeintoj* kapablis iam verki tiom bele kiel nia Kreŝimir' antaŭ ol forlasi Esperanton, eĉ dum sia dumviva esperantis-teco!

Per tiu diskonigo de tiu verko en niaj paĝoj mi volis honori tiujn, kiuj iam konsideris, ke Esperanto estis bona ideo, sufiĉe por peni lerni paroli kaj uzi ĝin, kaj tamen poste foriris el niaj vicoj, pro ĉia ajn kialo. Dum ili estis kun ni, ili utilis al Esperanto, kaj sekve ni ne malestimu ilin. Eĉ se ne multe, ili ankaŭ helpis nin sulkinte per siaj fosiloj.

Revenante al referencata verko, kiam ni komencis legi ĝin ĉi tie, antaŭ 20 jaroj (fakte ĉe nia numero 50^a), kelkaj esperantistoj skribis al mi, sendube dubante ĉu ni sukcesos, dezirante bonan ŝancon pri tio, ke ni iam finigos la taskon. Tamen, jen la lasta ĉapitro de tiu verko, kiun neniu esperantisto povos diri ne koni eĉ per aŭdo, ĉar oni jam povas libere kaj senpage legi ĉe niaj paĝoj de nun por ĉiam. Granda kaj grava tasko estis por ni, kaj ni fiere povas diri, ke jam finis epoko de nia magazino pro tiu disvastigo. Tamen, ni diru ion pli pri la verko:

La ĉefa persono je la verko, tiu Faraono, **Ramsez' XIII^a ne ekzistis**. Laŭ mia eltrovo, **ankaŭ ne ekzistis** ties patro laŭ la rakonto. **Ramsez' XII^a**, estante la lasta historia Ramzes' tiu kun nombro XI^a je la dekunua jarcento antaŭ Kristo, de la 20^a dinastio, kaj li kunhavis povon al pastroj Smendes' kaj Herihor', el kiu eble Prus elektis la nomon por Herhor'. Pro tio oni ne neglektu la personon, ke ĝi temas pri **fikcia verko, ne historia**. Multaj homoj kredas, ke historiaj noveloj pliampleksigas onian konon pri historio, sed tio estas grava eraro. Novelo ne estas eseo aŭ tezo!



Pri la strukturo de la verko, ni ne sekvis la publikigon originalan en tri volumojn, kvankam mi komprenas, ke pro tiutempaj limigoj materialaj, ne estis facile printi tro dikajn librojn, sed tamen tio ne plu gravas en la nunaj tempoj interretaj. Pro tio mi nombrigis la ĉapitrojn sinsekve, de la unua ĝis la lasta. Se oni deziras *honorigi* la originalan eldonon, sciu, ke la **Dua Volumo** komencas ĉe ĉapitro **26^a** (*Kajeroj el la Sudo* numero 80^a) kaj la **Tria Volumo** ĉe la ĉapitro **51^a** (*Kajeroj el la Sudo* numero 102^a). Se oni deziras havi la verkon en la hispana lingvo, oni povas trovi ĝin ĉe Librovendejo Alcaná, de Madrido, kontraŭ ĉirkaŭ €8. Eble tio estos bona maniero pliperfektigi la uzon de la lingvo, komparante ambaŭ versiojn, hispanan kaj esperantan.

La projekto kunhavi gravajn verkojn en Esperanto al legantoj de nia magazino daŭrigas per verkitaj tradukoj el gravaj verkoj, aŭ novaj tradukoj de ni mem. La venonta verko estintus **Defendo de**

Hispaneco, de grava intelektulo de la Generacio de la 98^a jaro Ramiro de Maeztu, senjuste pafmurdita de sekteculoj dum la Hispana Intercivitana Milito je 1936^a. Estas fama sia lasta diraĵo al siaj murdistoj: *Vi ne scias kial vi murdas min, sed mi ja scias kial mi mortas: por ke viaj gefiloj estu pli bonaj ol vi!*



Maeztu

Tamen, venis en miajn manojn interesan verketon, kiun mi ne volas lasi nekonate al legado de niaj geamikoj, ĉar ties politika kaj homisma sintenoj estas riveliga kaj imitinda:

Pri civila malobeco, de usona verkisto Henry David Thoreau. Li estis en karcero pro tio, ke li ne volis pagi impostojn por ke oni uzu ilin por financi la maljustan militon kontraŭ Meksikio (kiu okazis de jaroj 1846^a ĝis 1848^a, finante kun perdo de la duono de la teritorio de tiu lasta lando). Ĝi ne estas longa verko, tamen grava, kaj ties enhavo konvenas al liberaĉana kaj sennacia homo, kaj ankaŭ al pacamanto. Ekzistas jam esperanta versio elangligita de Brian Mc Clafferty, publikigita de SAT, sed mi ellangligas ĝin denove por eviti kopirajtajn problemojn.



H.D. Thoreau

Ĉe paĝo 19^a oni povas legi la unuan paĝon de tiu interesega verko.

Jesuo, redaktoro

Forigita de vento, suda epopeo

Antaŭ kelkaj semajnoj mi legis ĉi tiun verkon de Margaret' Miĉel. Ŝi verkis ĝin dum dek jaroj, post ŝi havis aŭtoakcidenton, kiu tenis ŝin hejme pro sanaj kialoj.

La libro temas pri la Intercivitana Milito en Usono de 1861^a ĝis 1865^a. La sudaj ŝtatoj, de Florido al Arizono, dek entute, apartiĝis el la unuiĝo de Usono tiutempe. Ŝajnas, ke laŭ la usona konstitucio tion povas fari individuaj ŝtatoj, ĉar la federacia unuiĝo estas libervola decido, kaj sekve ties malunuiĝo ankaŭ devas esti, laŭ tezo rezonita de vicprezidanto de la Konfederacio de Ŝtatoj de Ameriko, Aleksandro Stifenz, garantiata de la leĝo mem, kiel proklamas la Konstitucio de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, nome USA —

esperantlingve Usono—, per sia libro ***Konstitucia vido pri la ĵusa milito inter la ŝtatoj, ties kaŭzoj, karaktero, konduto kaj rezultoj***, kiun li publikigis je 1868^a. Kvankam oni propagandas, ke la kaŭzo de la milito estis batali kontraŭ sklaveco de nigruloj, tiu estis sengrava kialo por nordistoj. La vera batalo estis inter federaciismo (sudo) kaj unuiĝismo (nordo), sed ankaŭ temis pri ekonomio: la nordaj ŝtatoj estis industriaj, dum sudaj estis agrokulturaĵoj, kaj sekve ili dependis de manlaboro de sklavoj.

Kaj sur tiu fono milita okazas amrilato sen feliĉa fino, kiun ni vidis sur granda ekrano aktorigite de Clark Gable kaj Vivien Leigh, tiumomente nekonata aktorino. Estas debatinde, ĉu la aŭtorino volis verki duan parton de la rakonto, sed multaj jaroj pasis ĝis kiam ŝi komencis la aferon, kiun nova aŭtoakcidento malebligis, ĉar tiufoje rezulto estis morto de Margaret' Miĉel.



Omaĝe al defendintoj de Libereco, Egaleco kaj Frateco

Miaj kamaradoj ne plu estas. Mi ne scias kiom longe mi povas daŭri en ĉi tiu pozicio. Mi havas sufiĉe da municio por teni tiujn kontraŭulojn for, sed ili estas multaj, kaj mi estas nur unu.



Mi estas ĉe Gandesa. Oni vundis min en la ŝultro komence de la batalo. Mi vekiĝis kun febro kaj frostotremoj. Estas multaj mortintaj kamaradoj apud mi, ankoraŭ kun la fusiloj en la manoj. Estas pro ili, ke mi povis anstataŭigi la kuglojn,

kiujn mi uzas. Anstataŭ ŝargi mian fusilon, mi iras al la loko, kie ili estas kaj uzi iliajn.

Kial neniu alia vivas? Kiam mi vekiĝis, mi manĝis ion, mi trinkis, kaj kiam mi vidis la aliajn alproksimiĝi, mi aktivigis la mitralon kaj *ekspedis* kelkajn. Ili forkuris reen en sian tranĉeon. Ili pafis min, sed ili ne sciis, de kie venis miaj pafoj. Mi rampis ene de la tranĉeo, pafante de diversaj lokoj, do mi preskaŭ neniam maltrafis la pafon, kaj anstataŭe ili ne batis min.

«Kapitano, li estas nur unu!», mi aŭdis, ke unu el ili diris.

Mi respondis per pafado al ties gorĝo. Liaj kunuloj kombis la areon per furioza pafado, kiun mi ne povis respondi, pro evidentaj kialoj. Mi kaŝis min ĉe la fundo de la tranĉeo, kaj ŝteliris al alia pozicio, pli for. Kiam mi vidis, ke ili fine eliras, rampante sed trans malfermitan teron, mi *ekspedis* tri el ili antaŭ ol ili reiris en sian lokon.

Estas amuze la kontrolo, kiun oni povas fari de tranĉeo, se oni havas bonan traflerton... Mi ĉiam sukcesas kapti ilin flanken, kaj ili neniam trafis min, ĉar mi moviĝas kiel serpento. Kontraŭfaŝisma mortiga serpento.

Antaŭ kelkaj tagoj mi trovis la mikrofonon, per kiu tiuj niaj parolis kun la kontraŭuloj per la paroliloj, kaj mi komencis kanti belan

kanton:

Se vi volas skribi al mi, vi scias mian lokon ...

Sur la fronto de Gandesa, la unuan pafantan linion ...

Tiuj aĉuloj respondis per pura pafo, kaj du el la tri laŭtparoliloj en la tranĉeo estis ruinigitaj. Porkoj.

Mi ne scias, kiom longe mi povos daŭri ĉi tie. Sed **Vivu la Respubliko!**

Mi skribas por la rekordo de mia lukto por la idealoj de libereco kaj demokratio. Mi ne scias, ĉu iu legos ĉi tiujn paperojn, aŭ ĉu ili bruligos ilin, aŭ viŝos sian pugon kun ili, sed dum mi skribas per ĉi tiu malglata krajono, kiun mi trovis, mi kuraĝigas min, kaj tio sufiĉas.

Foje mi diras al mi, ke mi estas idioto, ke mi povus esti en mia urbo, en Whitby, kun miaj familio, kun laboro, kiu permesus al mi edziĝi kaj vivi kun Vivien, mia koramikino. Sed mi membriĝis al la 15^a Internacia Brigado por batali por miaj ideoj, por libereco, egaleco, frateco. Kiam ni eniris la trajnon, mi renkontis iun Eric Blair, kiu loĝis en Parizo, sed estas anglo kiel mi. Li diris al mi, ke li ŝatas verki, ĉar post longa tempo estas bone legi tion, kion oni skribis antaŭe kaj vidi kiel lia vivo ŝanĝiĝis. Mi faras ĉi tion por tio. Eble li estas unu el tiuj, kiuj legos ĉi tiun resumon pri mia sperto pri ĉi tiu fronto.

Kion faras Vivien nun? Certe ŝi edziniĝis al iu, eble ŝi havas infanon, la infanon, kiu povus esti mia... Sed, nu, neniu donos al ni liberecon. Ni devas defendi ĝin per pura pafo, se necese, kiel ĉi tie, en ĉi tiu lando. Demokrataj landoj estas ĉirkaŭataj de totalismoj: en Italio estas faŝistoj, en Rusujo komunistoj, en Germanio nazioj... Oni diras, ke ĉi tiu Milito en Hispanio estas la provludo por la sekva mondmilito. Se jes, ni devas venki ĝin. Kvankam ŝajnas, ke mi restis sola...

Ĉar nun mi estas sola, sed kiam mi alvenis ĉi tien, ni estis multaj. Antaŭ kelke da tempo ili ĵetis bombon en lokon, kie mi estis nur kelkajn minutojn antaŭe. Feliĉe mi moviĝis iomete pli ol kutime, ĉar mi serĉis manĝaĵon kaj mi ne trovis ĝin ĝis mi foriris tricent metrojn, en la poŝo de unu el la falintaj kamaradoj. Ĝi estis stango de ĉokolado. La vizaĝo de la kompatindulo frakasiĝis. Bastardaj

faŝistoj. Domaĝe, ke ne estas infero, ĉar se estus, ĉiuj tiuj hundidoj irus tien dekape, gvidate de Franketo, tiu afrika fekulo.

Kiam ni alvenis, la kolonelo diris al ni, ke ni devas rezisti ĉion necesan, por ke la aliaj kamaradoj de aliaj brigadoj povu retiriĝi al la alia flanko de la rivero Ebro kaj savi valoran militan materialon. Kaj ankaŭ estas la civiluloj. Ili devas esti evakuitaj al Francio kiel eble plej baldaŭ, por ke la faŝisma hordo ne mortpafu ĉiujn.

Kiujn mi ne vidis inter la mortintoj, estas la politikaj komisaroj, kiuj turmentis nin per siaj ideologio kaj paroladoj de kiam niaj kamaradoj el Anglujo, Francujo kaj Italujo alvenis al la Brigado. Kie ili estas nun?

Mi ankoraŭ ĉagreniĝas. Tiom da morto ĉirkaŭ mi ne donas al mi la forton daŭrigi. Mi kredas, ke strategia retiro estas en ordo. Sed... se mi translokiĝos de ĉi tie, ili vidos, ke mi estas nur unu, kaj ili ĉasos min kiel kuniklon. La tranĉeo estas mia vivasekuro. Ĝis ili mortigos min, kompreneble. Ili estas multaj. Mi estas nur unu. Ne, mi ne volas foriri de ĉi tie.

Sed kion mi provas fari? Ĉu mi venkos la militon? Eble ili sendos plifortikigojn... Antaŭ iom da tempo mi vidis la radioaparaton en la dorsosako de tiu, kiu ĝin portas. Oni pafis lin en la kapon, kompatindulo. Jes, ĝi funkciis ankoraŭ. Mi telefonis, sed neniu respondis. Kie estas tiuj miaj? Ĉu ili ĉiuj jam iris en Francion?

Ĉi tiun malvarman matenon de la 28-a de aprilo 1938^a mi maltrankviliĝis. Mi vidis fusilon moviĝi super la tranĉeo. Malamiko estis enŝteliĝonta! Mi tiris la barelon malsupren, kaj ekspedis ĝin per pafado de la leŭtenanta pistolo, kiun mi prenis antaŭ tagoj de ties kadavro. Mi neniam mortigis iun tiel proksime. Tiu junulo surprizite rigardis min antaŭ ol lia cerbo disiĝis ĉirkaŭ ni. Kompatindulo.

Tio igis min fari al mi pli da demandoj. La plej terura estas: Kion diable mi faras ĉi tie? Kiel mi povus klarigi ĉi tion al miaj infanoj aŭ miaj nepoj? Mi mortigis homojn, tute malplenajn, kiel ĉi tiun preskaŭ infanon hodiaŭ matene. En la nomo de libereco, egaleco, frateco. Ĉu vere? Ĉu oni mortigas homon pro frata amo? Kia ironia! Nun li mortis, kaj mi ne. Ĉu tio estas egaleco?

Mi havas tre limigitan liberecon, ĉar mi ne plu povas eliri el ĉi tiu tranĉeo kaj resti viva. Sed li ne plu havas ĉu vivon ĉu liberecon.

Ne, mi ne devas resti ĉi tie. Ĉi tio ne estas vivo. Neniu venos serĉi min. Aŭ por helpi min. Mi stultas por nenio, tiel diri. Mi retenas multajn soldatojn de la alia flanko, sed mi ne daŭros longe, se mi daŭros tiel. Ili timas same kiel mi timas. Estos plej bone, se mi foriras.

Ĉi tiu longa letero atestu, ke mi, Harold MacFerris, estis ĉi tie, en la Fronto Gandesa, Tarragona provinco, Hispanio, defendante Liberecon, Egalecon kaj Fratecon, kun majuskloj, koste de libereco, egaleco kaj frateco kun tiuj fronte al mi, kun iliaj individuaj liberecoj, kiujn miaj kugloj ne respektis, same kiel iliaj forprenis de mi la mian. Mi nek konsideras ilin miaj egaluloj, nek mi amas ilin kiel fratojn, ĉar ili estas faŝismaj porkoj. Tial ili ne samas kiel mi, kiuj defendas miajn respublikanajn ideojn. En mia lando ne ekzistas respubliko ekde la 17^a jarcento, bedaŭrinde, sed dum mi loĝis tie, mi sentis min pli libera ol ĉi tie.

Tial mi pensas foriri. Sed ĉu mi povas fari tion? Tiuj aĉuloj tie ekstere, mi ne kredas, ke ili pardonos min, ke mi finis tiom da iliaj kunuloj. Ili certe mortopafos min sen ia ajn procedo, eĉ ne kortumo.

Nu, mi sukcesis eskapi laŭ la deklivo sen esti vidita. Poste mi saltis en la riveron kaj naĝis al la alia flanko. Kaj marŝante, marŝante, post kelkaj tagoj mi alvenis en Francion. Tie la francoj donis al mi trajnobileton al Londono.

Nun mi estas hejme, kun mia familio. Vivien mortis en la mondmilito. Ili vokis min, kaj mi estis en la Hejma Gvardio, ĉar mi fartis malbone pro la Hispana Milito. Mi patrolis la marbordon dum kvin jaroj. Nun mi estas rompita ludilo, kiu ne povas ĉesi paroli pri milito... Dio, ĉu vi iam pardonos al mi pro tiom da homoj, kiujn mi mortigis? Mi legis du librojn de Eriko, kiun li subskribas kiel George Orwell, **1984^a** kaj ***Omaĝo al Katalunio***, kaj nun mi komprenas, ke en la milito ni estis trompitaĵ. Li kaj mi...

Dio savu la reĝon, dum multaj jaroj.

Noto de la Redaktoro.- La Reĝo de Britio, la patrujo de Harold, Georgo la 6^a, mortis 14 jarojn post la komenco de tiu eta militotaglibro. Lia filino, aliflanke, Elizabeto la 2^a, ŝajnas obei la dezirojn de Harold, ĉar ŝi estas en oficejo dum preskaŭ 70 jaroj.

Sano

Vakcinoj por ĉiuj

Hispanio suferas la plej gravan katastrofon de post la Intercivitana Milito, la tiel nomita Pandemio de KRONVID19, la Malsano de kronviruso. De marto de 2019 ni estas blokataj ĉu en niaj hemoj, ĉu en niaj provincoj, ĉu en niaj komunumoj.

Estas koincido, ke en ambaŭ gravaj malgrablaj eventoj la partio en povo estas la sama, PSOE. Kaj en ambaŭ fojoj tiu partio ne scias kion fari por la bono de la povo. Sed tamen, ambaŭfoje ĝi penas premi sian ideologion en la popolon, eĉ se ni, la popolo, tute prifajfas pri tiuj sensencaĵoj. Tuj kiam ĉi tiun artikolon mi verkas, okazos la balotado por la Komunumo de Madrido, la plej riĉa komunumo de Hispanio. Eble pro tio ke socialistoj ne estis en povo tie de antaŭ 26 jaroj.

Nun Madridan Komunumon prezidas virino, Isabel Díaz de Ayuso, kiu regas la pandemion per pli efika maniero ol Centra Registaro de Pedro Sánchez sukcesis fari. Unue, tiu ĉi diris, ke ne estas problemo: la viruso ne atingos Hispanion. Pro tio, ke oni faris nenion, ĝi atingis nin pere de flughaveno. Poste oni diris, ke ni restu hejme, sed oni ne uzu maskon, ĉar ĝi ne efikas. Poste, ni ĉiuj devas uzi ĝin pro dekreto de registaro de Sánchez. Sed ne gravas tio, kion la registaro faras, la pandemio kreskis en Hispanio. Sekve, la Centra Registaro decidis lasi la aferon en la manojn de la aŭtonomiaj registaroj. Inter ili, kelkaj estis tre timemaj, kiel tiu de Valensjo, kaj malplej timema estis la madrida komunumo, kie oni permesis restoraciojn kaj trinkejojn denove funkcii kun certaj limigoj. Sed estas malpli da mortintoj kaj infektitoj en Madrido ol en Valensjo. Mursja komunumo estas unu el la malplej infektitaj kaj plej limigitaj, interkrampe. Niaj politikistoj estas timemaj kaj nesciaj.

Unu jaron post la apero de la pandemio jam estas kelkaj vakcinoj por batali ĝin: Pfizer, Astrazeneko, Moderna, Sputnik'... Se oni rigardas la informojn el niaj amasrimedoj, oni devas nepre ricevi vakcinon, ĉar alimaniere oni mortos. Sed per interreto ni ricevas alian kanton: la tuta afero, kaj pandemio kaj vakcinoj, estas nur peno instaŭri mondan diktatorecon kontraŭ niaj liberecoj kaj bonfarto... Do, kion fari? Ĉiu faru sian propran decidon.

Mi mem decidis, ke se ĉio dirata estas vera, mi preferas morti rapide (pro sekvo de vakcino) ol mizere longe pro la pandemio mem. Pro tio mi jam ricevis Pfizeran vakcinon. Sed mi ne havas konsilon doni al leganto...

*Sanigaj
murdoj*

5 Nokta sesio

Kompreneble mi vokis ŝin. La libro priskribis ion malsanan. Homoj ĝuis bati aliajn homojn, aŭ suferi punon de aliaj homoj. Sadistoj kaj masohistoj. Homoj, kiuj ĝuis ligi aliajn homojn kvazaŭ malamikojn venkitajn en batalo. Homoj, kiuj ĝuis senti sin humiligitaj aŭ humiligantaj aliajn. Ili estis frenezuloj. Kaj Tomas' estis unu el ili. La viro, kiu ĝuis la favorojn de mia amata, malestimis sin surgenuiĝante antaŭ ulino kiel Silvja, por ke ŝi batu lin per bastono aŭ vipo: Sodomo kaj Gomoro.

La mondo estas freneza. Sed ankoraŭ ekzistas homoj kun iom da prudento, kiuj povas rektigi ĉion ĉi. Ju pli mi legis la libron, des pli mi malamis Tomason. Mi intencis punaĉi ĉi tiun ulon. Tuj kiam mi ekvidos lin, mi aranĝos lin.

Sed unue mi devis ekscii ĉion. Kaj por tio mi bezonis Silvjan. Tial mi vokis ŝin kaj kaŝis min kiel sklavon.

Mi faris la rendevuon, kiun mi petis tiutempe, kiam mi sciis, ke Tomas' estos tie:

«Bonan vesperon sinjorino. Mi estas Osvaldo».

«...»

«Jes, repensis mi pri la afero. Mi legis la libron. Jes, interesiĝas mi pri la afero»

«...»

«Ĉu €100? Konsentite. Sesio kontraŭ €100. Unuhora, mi supozas. Sed unue plaĉus al mi, ke vi montros al mi ĉion, pri kio temas.

«...»

«Jes, la libro enhavas ĉion, sed



tio estas teorio. Mi dezirus vidi vin praktike agante».

«...»

«Nu, bone, mi povas morgaŭ je la kvina kaj duono».

«...»

«Kompreneble. Nu, mi komprenas, jes Konsentite».

«...»

«Jes, kiel vi diras, mastrino. Je la sepa, do. Morgaŭ je la sepa. Sed vi ne povas averti min, ĉar mi ne havas poŝtelefonon..., ne, mi neniam havis, kaj mi ne povas pagi ĝin. Sed mi ne eniros ĝis kiam vi diros al mi».

Je kvarono antaŭ la sepa mi vidis, de malantaŭe stratlampo cent metrojn for, kiel Tomas' eliris la pordejon de Lady Silvja. Pacience mi promenadis laŭ apuda strato por pasigi la tempon. Je la sepa akurate mi premis la sonorilbutonon de la loĝejo de Lady Silvja.

«Eniru, hundo», ŝi diris malafable. «Sidiĝu kaj rigardu. Ni parolos poste».

Sidinte ĉe angulo de tiu vasta salono, el duonombro mi vidis kiel tiu virino nudigis alian, pli junan, kaj nodis ŝin sur specon de ikso ega ligna. El ĉiu mammo pendas borita ringo, el kiu la alia frenezulino tiris fojfoje. Kvankam ŝi certe doloris, ŝajnis al mi, ke la litigulino plendas pro pura procedo. La mastrino alparolis ŝin per fia kaj tre humiliga lingvo.

Poste li batis ŝin per ia vipo kun multaj vosto sur ŝia brusto kaj stomako. Sekve, ŝi liberigis ĝin kaj frapis ŝin sur la dorson per ununura senhelpa vipo aŭ vosto, kaŭzante pli da damaĝo.

Fine tiu knabino, kies nomo estis Erika, ricevis permeson de sia mastrino foriri, kion ŝi faris, kisinte la plandojn de ŝiaj botoj. Ĉi tiuj homoj ŝajnis frenezulinoj.

«Nu, Osvaldo, kion vi pensas pri ĝi?», ŝi demandis min kun neatendita plaĉo.

«Nu ... Mi ne povus diri al vi, sinjorino. Ĉi tio estas ... malsama».

«Ĉi tio estas en la libro, ĉu ne?»

«Jes, kompreneble».

«Kaj ĉu vi ne plu interesiĝas?»

«Mi ne scias. Mi supozas, ke jes. Mi venis, ĉu ne?»

«Ni faru teston. Surgenuiĝu».

Tiel mi faris, kaj tiu porkino donis al mi la du plej fortajn vangofrapojn, kiujn mi iam havis en mia vivo.

En tiu momento mi ne povis eviti ĝin: mi ekstaris kaj pugnobatis ŝin sur la mentonon, senkonsciigante ŝin.

Kiam ŝi revenis en sin, ŝi estis tiu ligita al la X.

«Kion oni sentas ligite tie?» Mi demandis. «Ne plu mojose, ĉu? Vi estas perversulino, vi porkino».

Sed la porkino povis diri nenion, ĉar mi metintis gagon sur ŝin. Ŝi diris nenion, kiam mi trafrapis ŝian vizaĝon per ŝia plej peza vipo.

Mi aŭdis krieton malantaŭ mi kaj ektuniĝis: Erika ankoraŭ ne foriris. Ŝajne ŝi duŝis sin kaj venis adiaŭi sian mastrinon. Saltante mi alproksimiĝis al ŝi kaj frapis ŝin per pugnbato, sed mi estis tiel malbonŝanca, ke kiam ŝi falis, ŝi batis sian tempion kontraŭ seĝon, post kiam ŝi resaltis la kapon de la muro kaj ŝi restis tie, kie ŝi estis, mortina. Mi ne scias. Mi ne planis ĝin, sed mi ne sentis kulpon. Unu malpli perversulo en la mondo. La alia virino tordiĝis en sia X kiel posedata virino kaj kriegis, evidentiĝis, kvankam la mutilo, kiun mi surmetis sur ŝin, estis efika kaj oni ne povis distingi ion, kion ŝi diris, oni eĉ ne povis aŭdi ion krom iometan nekompreneblan murmuron.

En tiu momento la pordotelefono sonoris, kaj ni ambaŭ silentis, kvazaŭ ĝi estus frosta bildo de filmo, ĉiu atendente, kion faros la alia. Fine la telefono ĉesis sonori. Tra la fenestro mi vidis viron foriri.

"«Malbonŝanco, putino», mi diris al Silvja. «Mi ne intencis iri tiel for, sed vi vidis tro multe».

Mi alproksimiĝis al ŝi kaj ĉirkaŭvolvis ambaŭ manojn ĉirkaŭ ŝia gorĝo, kaj premis lante.

Mi sentis ŝiajn karotidojn pulsadi kontraŭ miaj manoj, kiujn mi ne malfermis ĝis la pulsoj ĉesis. Mi apogis mian orelon kontraŭ ŝia bruston, sed nenion aŭdis: la mastrino mortis. Mi prenis la korpon de la alia kaj metis ĝin antaŭ ŝian mastrinon. El liaj ludiloj mi nur tuŝis vipon, do mi metis ĝin en rubsakon por forpreni ĝin. Mi bone purigis la seĝon, en kiu mi sidis. Poste mi ekprenis la rendevuan libron de Silvja kaj estingis ĉiujn lumojn en la domo antaŭ trankvile foriri.

Nun mi havis la telefonnumerojn kaj moknomojn de ĉiuj siaj klientoj kaj amikoj. Ili kondukus min al ĉiuj aliaj perversuloj en la urbo. En tiu agendo estis pli ol cent homoj. Mi intencis ekstermi ĉiujn. Mi ne volis, ke la urbo, kie mi loĝas, estu Sodomo kaj Gomoro. Ne se mi povus haltigi ĝin.

Mi revenis hejmen kun la vipo kaj libro de Silvja, kaj mi surpriziĝis, ke mi ne sentas penton pro tio, ke mi mortigis du virinojn. *Du malpli da perversuloj en la mondo*, mi diris al mi, *ili ne meritis vivi*.

Sed mi sciis, ke se polico povus sekvi min, la vipo kaj la rendevulibro povus esti uzataj kiel atesto kontraŭ mi. Kaj ne estas juste, ke deca persono, mi, pagos pro du perversuloj, ili. Cetere, se ili metos min en malliberejon tridek jarojn, mi ne povos plenumi mian purigan mision. Tial mi kopiis ĉiujn kaŝnomojn kaj telefonnumerojn sur paĝoj kaj tiam mi reiris al Strato de la Fiŝo kaj ĵetis ambaŭ objektojn en la rubujon de Silvia, kvazaŭ ŝi estus farinta ĝin.



La Faraono

Ĉapitro 68^a kaj lasta

De la morto de Ramzes' XIII ĝis la tago de lia enterigo regis la ŝtaton la plej nobla San-amen-Herhor, kiel la ĉefpastro de la teba Amon kaj vic-reĝo de la mortinta faraono.

La kelkmonata regado de la vic-reĝo estis tre prospera por Egipto.

Herhor kvietigis la ribelojn de la popolaĉo kaj, kiel estis iam, permesis al la laboristoj ripozi ĉiun sepan tagon. Li enkondukis severan disciplinon inter la pastrojn, ĉirkaŭis per sia protekto la eksterlandulojn kaj precipe Fenicianojn, kaj faris traktaton kun Asirio, ne cedante tamen Fenicion, kiu restis tributano de Egipto.

Dum la mallonga regado la justeco estis plenumata rapide, sed sen krueleco, kaj neniu kuraĝis bati la egiptan kamparanon, kiu povis sin turni al la tribunalo, se li havis sufiĉe da tempo kaj atestantoj.

Herhor sin okupis ankaŭ pri la ŝuldoj, ŝargantaj la faraonon kaj ŝtaton. Por ĉi tiu celo li igis

Fenicianojn rezigni parton de la sumoj, ŝuldataj al ili de la ŝtato, kaj por pagi la reston li prenis el Labirinto la grandegan sumon da tridek mil talentoj.

Dank' al ĉi tiuj rimedoj, post tri monatoj ekregis en la lando trankvilo kaj bonstato, kaj la regnantoj ripetis:

—Benata estu la regado de la vic-reĝo San-amen-Herhor! Vere, la dioj destinis lin esti regnestro, por ke li liberigu Egipton de la malfeliĉoj, kiujn



Funebro por l' Faraon'

altiris Ramzes' XIII, senreligia virinamanto...

Kelkdeko da tagoj sufiĉis, por ke la popolo forgesu, ke ĉiuj verkoj de Herhor estis nur plenumo de la intencoj de la juna kaj nobla faraono! En la monato Tobi (oktobro-novembro), kiam la mumio de Ramzes'

XII^a jam estis metita en la reĝajn kavernojn, en la templo de la teba Amon kunvenis ĉiuj plej altrangaj personoj de la ŝtato. Estis tie preskaŭ ĉiuj ĉefpastroj, nomarĥoj kaj generaloj, kaj inter ili Nitager, la kovrito de la gloro maljuna ĉefo de la orienta armeo.

En la sama grandega ĉambreĝo, ĉirkaŭita per kolonoj, kie antaŭ duono da jaro la pastroj juĝis Ramzes'on XII kaj montris sian malbonvolon al Ramezs XIII, en la sama loko kunvenis hodiaŭ la altranguloj, por solvi, sub la prezido de Herhor, la plej gravan ŝtatan aferon. La 25-an de Tobi tagmeze Herhor, portante la tiaron de Amenhotep, sidiĝis sur la trono, la aliaj sur seĝoj, kaj la kunsido komenciĝis.

Ĝi daŭris ekstreme mallonge, kvazaŭ ĝia rezultato estus antaŭe preparita.

—Ĉefpastroj, nomarĥoj kaj militestroj! —komencis Herhor. — Ni kunvenis ĉi tien por tre malĝoja kaj grava afero. Kun la morto de la eterne vivanta Ramzes' XIII, kies mallonga kaj uragana regado finiĝis tiel malfeliĉe...

Herhor eksopiris.

—Kun la morto de Ramzes'

XIII^a ne nur estingiĝis la Faraono, sed la glorplena dinastio XXII-a...

Murmuro traflugis inter la kunvenintoj.

—La dinastio ne finiĝis —intermetis preskaŭ malĝentile la potenca memfisa nomarĥo. — Vivas ja la respektinda reĝino Nikotris, al ŝi do apartenas la trono...

Post momento Herhor respondis:

—La plej nobla mia edzino, la reĝino Nikotris...

Ne murmuro, sed krio eksonis nun kaj daŭris kelke da minutoj. Kiam ĉio eksilentis, Herhor daŭrigis trankvile kaj klare:

—Mia plej nobla edzino, la reĝino Nikotris, nekonsolebla post la morto de sia filo, rezignis la tronon...

—Pardonu!... —ekkriis la memfisa nomarĥo. —La plej nobla vic-reĝo nomas la reĝinon sia edzino... Tio estas fakto tute nova, kiun oni devas, antaŭ ĉio, kontroli...

Herhor faris signon. La plej alta tebana juĝisto montris la akton pri la edziĝo de la plej nobla ĉefpastro de Amon, Sanamen-Herhor, kun la reĝino Nikotris, vidvino de Ramzes' XII^a kaj patrino de Ramzes'

XIII^a.

Post ĉi tiu klarigo ekregis tomba silento. Herhor daŭrigis:

—Ĉar mia edzino, la sola heredanto de l' trono, forlasis siajn rajtojn, ĉar tiamaniere finiĝis la regado de la XXII-a dinastio, ni devas elekti novan monarĥon... Ĉi tiu monarĥo —daŭrigis Herhor —devas esti homo matura, energia kaj sperta en la regado. Tial mi konsilas al vi, ekscelencoj, elekti por ĉi tiu plej alta posteno...

—Herhoron!... —ekkriis iu.

—Elekti la plej gloran Nitageron, la ĉefon de la okcidenta armeo —finis Herhor.

Longan momenton sidis Nitager kun fermitaj okuloj, ridetante. Fine li leviĝis kaj diris:

—Neniam, sendube, mankos homoj, pretaj akcepti la titolon de faraono. Oni eĉ eble havus tro multe da ili. Feliĉe la dioj mem, forigante la danĝerajn konkurantojn, montris al ni la homon, plej indan ricevi la faraonan povon. Kaj ŝajnas al mi, ke mi faros prudente, se anstataŭ akcepti la kronon, favore proponitan al mi, mi respondos:

—Vivu eterne lia sankteco San-amen-Herhor, la unua farao-

no de la nova dinastio!...

La ĉeestantoj, kun malmultaj esceptoj, ripetis la ekkriion, kaj samtempe la plej alta juĝisto alportis sur ora plado du ĉapojn: blankan de Supra Egipto kaj nigran de Malsupra. La unuan prenis la ĉefpastro de Oziriso, la duan la ĉefpastro de Horus kaj transdonis ilin al Herhor, kiu, kisinte la oran serpenton, metis ambaŭ sur la kapon.

Poste komenciĝis la ceremonio, kiu daŭris kelke da horoj: ĉiuj prezentis sian respektigon al la nova sinjoro. Fine, oni skribis konforman akton, la partoprenantoj en la elekto surmetis siajn sigelojn, kaj de tiu momento San-amen-Herhor fariĝis la vera faraono, la sinjoro de la du mondoj, kaj de la vivo kaj morto de siaj regnantoj.

Vespere lia sankteco revenis laca en siajn ĉefpastrajn ĉambrojn, kie li trovis Pentueron. La pastro estis pala, kaj sur lia malgrasa vizaĝo oni povis legi laciĝon kaj malĝojon.

Pentuer falis sur la vizaĝon. La sinjoro levis lin kaj diris kun rideto:

—Vi ne subskribis mian elekton, vi ne prezentis al mi vian respektigon, kaj mi timas, ke mi devos iam sieĝi vin en la templo de Ptah!... Vi ne

decidiĝis resti ĉe mi? Vi preferas Meneson?...

—Pardonu via sankteco —respondis la pastro —sed la kortega vivo tiel lacigis min, ke la sola mia deziro estas hodiaŭ lerni la saĝon.

—Vi ne povas forgesi Ramzes'on? —demandis Herhor. —Tamen vi konis lin tre mallonge, kaj ĉe mi vi laboris kelke da jaroj.

—Via sankteco ne kondamnu min, sed Ramzes' XIII estis la unua Faraono, kiu sentis la doloron de la egipta popolo...

Herhor ekridetis.

—Ah, vi saĝuloj!... —diris li, balancante la kapon —vi, vi ja mem turnis la atenton de Ramzes' al la situacio de la popolaĉo, kaj nun vi portas je li funebbron en via koro, kvankam li faris nenion por la popolo... Vi tion faris, ne li... Ridindaj homoj vi estas, malgraŭ via potenca inteligenteco —daŭri-

gis Herhor. —Same Menes... Ĉi tiu pastro sin opinias la plej kvieta homo en Egipto, kvankam li faligis la dinastion kaj liberigis al mi la vojon al la povo!... Se li ne estus sendinta sian leteron pri la suna mallumiĝo la dudekan de Paofi, eble ni ambaŭ, la mortinta Mefres kaj mi, rompadus nun ŝtonojn en minejo... Iru jam kaj salutu Meneson en mia nomo. Memoru ankaŭ, ke mi scias esti dankema, kio estas la plej granda sekreto de la povo. Diru al Menes, ke mi plenumos ĉiun lian peton, se nur li ne ordonos al mi forlasi la tronon... Vi mem revenu al mi, kiam vi estos ripozinta, kaj mi konservos por vi gravan oficon.

Kaj li tuŝis per la mano la humile klinitan kapon de la pastro.

Fino



Pri la devo de civila malobeo

verkita je 1849 de Henry D. Thoreau
Tradukita de Jesuo de las Heras je 2021

Tutkore akceptas mi la devizon: *La plej bona registaro estas tiu, kiu regas malplej*; kaj mi ŝatus vidi, ke ĝi agos plej rapide kaj sisteme. Efektivigita, ĝi finfine egalas al ĉi tio, kion ankaŭ mi kredas: *Tiu registaro estas la plej bona, kiu tute ne regas*; kaj kiam homoj pretos por ĝi, tio estos la speco de registaro, kiun ili havos. Registaro plej bone estu taŭga; sed plej multaj registaroj kutime estas sentaŭgaj, kaj ĉiuj registaroj estas kelkfoje maltaŭgaj. La objetoj kontraŭ konstanta armeo, se multaj kaj pezaj, kaj certe triumfindaj, povas ankaŭ fine esti starigitaj kontraŭ konstanta registaro. La konstanta armeo estas nur brako de la konstanta registaro. La registaro mem, kiu estas nur la maniero, kiun la homoj elektis plenumi sian volon, same povas esti misuzata kaj perversagita antaŭ ol la homoj povas agi kontraŭ ĝi. Kiel atesto ni povas konsideri la nunan kontraŭmeksikan militon, laboron de kompare tre malmultaj individuoj, kiuj uzas la konstantan registaron kiel ilon; ĉar, dekomence, homoj ne konsentus ĉi tiun agon.



Ĉi tiu usona registaro (kio estas ĝi krom nur tradicio, kvankam freŝa, penanta transdoni sin sendifekta al la posteularo, sed ĉiumomente perdanta iom da sia integreco?) ne havas la viglecon kaj forton de unu sola vivanta homo; ĉar unu individuo povas fleksi ĝin laŭ sia volo. Ĝi estas ia ligna pafilo por la homoj mem. Sed ĝi ne estas malpli necesa por tio; ĉar la homoj devas havi iun komplikan maŝinaron aŭ alian, kaj aŭdi ĝian bruadon, por kontentigi tiun registaran ideon, kiun ili havas. Registaroj montras tiel, kiel sukcese homoj povas esti truditaj, eĉ truditaj al si mem por sia propra avantaĝo. Ĝi estas bonega, ni ĉiuj devas konsenti. Tamen ĉi tiu registaro neniam per si mem antaŭenigis iun ajn entreprenon, sed per la fervoro, per kiu ĝi forlasis sian vojon. Ĝi ne tenas la landon libera. Ĝi ne loĝigas la Okcidenton. Ĝi ne edukas.

Daŭrigota...



Kajeroj el la Sudo

Bulteno de Hispana Asocio
de Laboristoj Esperantistaj



<http://www.gazetoteko.com/hale/kels119.pdf>

Numero 119 - Aprilon 2021

Kazimierz
Bein, KABE,
tradukinto de
La Faraono.
Li pruvis, ke
traduki en
Esperanton
estas facile
kaj amuze.



ISSN 1886-1938 (printita)
ISSN 1886-1997
Depósito legal: Z-2398-88